


LA JUNIA VIVO



REDAKCIO KAJ
ADMINISTRADO:
WEST-GRAFTDIJK
(N.H.) NEDERLANDO
GIRO NUMERO 209354 NEDERL.

JARABONO:
NEDERLANDO:
0,80 GULDENO
ALIAJ LANDOJ:
14 FR.FR; 0,70 DOL; 2,15V.FR.

F. H. 52/341

MONATA ORGANO POR LA JUNULARO KAJ KOMENCANTOJ

Por progresintoj.

NOKTO EN LA VINTRO.

Jam pasis multaj jaroj, de kiam mi foje travivis miajn Kristnaskferiojn ĉe mia amiko en Spital, vilaĝeto apud la Semmering. La plej multajn horojn de la tre mallongaj tagoj ni pasigis sur la glitveturiloj; ni glitis malsupren en la Alpovalon, aŭ ni suriris la Semmering, por de tie rigardi sur la belan aŭstrian landon kaj al la hungaraj ebenaĵoj. Dum la longaj vesperoj ni sidis en la varma, hejmeca ĉambro kaj la tempo forflugis dum ni gaje interbabilis, legis aŭ ludis. Tial plej ofte jam estis noktmezo, kiam mi iris supren al mia dormĉambro.

En tiu ĉi ĉambro mi foje subite vekiĝis en malhelega nokto. Ekstere sur la vojo antaŭ nia domo sonis laŭta kriado, fortaj viraj voĉoj interkriis kaj brilo de torĉoj venis tra mia fenestro. Kiam la bruado iom pasis, mi vokis malsupren al mia amiko, kion oni faras ekstere. „Jes,” li respondis, „ili serĉas sesjaran knabeton. Hieraŭ li ne venis hejmen el la lernejo. Verŝajne li vojeraris. Ŝajnas, ke oni vidis lin iranta en la direkto al Kaltenbach kaj sur la Stuhlek, sed pli oni ne scias pri li.”

„Stulta knabo,” mi grumblis, dum mi ree serĉis la varmon sub miaj litkovriloj. Sed estis malfacile denove kapti la dormon kaj post momento mi denove kriis malsupren: „Ĉu vi jam dormas?”

„Ne,” respondis mia amiko.

„Nu, diru,” mi demandis, „en la Kaltenbach staras ja kelkaj domoj, ĉu ne?”

„Jes, certe.”

„La knabo verŝajne estas sufiĉe prudenta por peti tie rifuĝejon.”

„Tion ankaŭ mi supozas,” estis la respondo. Post tio ni ambaŭ silentis.

Sed la dormo estis for. Vojerarinta knabeto, vintronokto, senkon-

sola patrino kaj kelkaj homoj, kiuj suriras la montojn kaj vokas, vane vokas... tio estas pensoj, kiuj skuadas la liton, tiradas la litkovrilojn, turniĝas en la kapo kaj fine profunden fosas en la koro.

Mi saltis el la lito kaj laŭte diris al mia amiko : „Mi iras por serĉi. Ĉu vi kuniras?”

Neniu respondo.

„Vekiĝu nun!” mi kriis. Sed regis silento en la ĉambro de mia amiko, li estis jam for. Rapide mi vestis min, prenis mian montbastonon kaj ankaŭ foriris. Estis proksimume la dua horo, la nokto estis malluma kaj neĝis. En la intermontaĵo, la Kaltenbaŭ, mi vidis flagradon de torĉoj. Tien mi kuregis kaj trovis viron, portanta lanternon kaj litkovrilojn por la okazo, ke la etulo estus duonfrostiĝinta.

„De kiu la infano estas?” mi informiĝis.

„Se li ne estos trovata, mi mortigos min mem!” diris la lanternportanto.

„Li do estas via?”

„Ne!” li ekkriis, „sed mia malbenita stulteco estas la kaŭzo de ĉio!” Kaj post momento li ekrakontis : „Mi estas la servisto de Rohusberger. La knabo estas de nia servistino Kristina; ŝi venis kun li el Retteneg. Estas ne ordinare, kiel la knabo alkroĉas sin al la patrino. Sed jes, iun alian li ne plu havas en la mondo kaj aliaj homoj kelkfoje strange priraktas lin. Fakte plej bone tia bubo ja troviĝas en la lernejo.”

„Jes, estas vere.”

„Kiam li revenas el la lernejo, lia unua demando ĉiam estas : Kie estas mia patrino? Same hieraŭposttagmeze. Ĝuste mi estas ĉe la stalpordo hakante pajlon, jen li venas : Kie estas mia patrino? La ĉiama demandado! Kie ŝi povus esti, mi respondas grumble, ĉar ĝuste mi havas mian dentdoloran tagon. Ŝi iris al Retteneg kaj neniam ŝi revenos. Li alrigardas min, dum kelka tempo ĉirkaŭvidas kaj momenton poste li estas for. Ne daŭras longe, kiam lia patrino montras sian kapon ekster la stalpordon. Ĉu Franĉjo ne jam venis? Jes, mi diras, certe li eniris la domon. Sed kiam ni envenas en la domo por trinki kafon, Franĉjo nenie estas trovebla. Ankaŭ lia surtuto estas for. Kristina ne povas manĝi, sed rigardas el ĉiuj fenestroj. Mi ĉirkaŭiras la tutan korton kaj vokas al la knabo. Tiam diras iu najbarino, ke jam antaŭ du horoj ŝi vidis Franĉjon iranta al la Kaltenbaŭ. Nun fariĝas plej urĝa tempo, mi pensas, ke mi rakontu, ke verŝajne li kredis mian mensogeton. Do mi rakontas

ĉion kaj samtempe la mastro dissendas kelkajn servistojn. Sed al Kristina ni diras nenion pri tio; ni kredigas ŝin, ke li estas sur la glacio kun aliaj knaboj. Estas jam mallume, kiam la servistoj revenas. En la Kaltenbaha intermontaĵo ili perdis liajn postsignojn kaj ne sciis, kion plu fari. Kristina nun kompreneble scias tion... tre kviete ŝi restis kaj ŝi bone regis ŝin... ŝi diras, ke ŝi deziras, ke ĉiuj viroj el Spital eliru por serĉi la knabeton. Ŝi mem iras antaŭe. Dio donu, ke ni retrovu lin viva!"

Tion rakontis la servisto de Rohusberger, dum ni daŭrigis nian vojon. Inter la postsignoj de glitveturiloj ni vidis ĉie la piedpremojn de tiuj, kiuj jam antaŭiris nin. Kun ĝojo mi rimarkis, ke la glacitavolo, kiu formiĝis sur la neĝo ekster la vojo, bone tenis nin. Sen danĝero ni povus forlasi la vojon por serĉi kie ajn. Sed mia akompananto ne partoprenis en mia ĝojo. Eble ankaŭ Franĉjo forlasis la vojon, li diris, kaj ni tute ne eltrovos, kien li iris.

„Ĉu Franĉjo scias la vojon al Retteneg?" mi demandis.

„Li povas ĝin scii, ĉar la pasintan aŭtunon li venis al ni kun sia patrino, kaj ili sekvis ĉi tiun vojon."

„Do povas esti, ke li provis reiri al Retteneg laŭ la sama vojo!"

„Bona ĉielo!" kriis la servisto. „La vojo kondukas trans la montaro. Li certe ne alvenus tra la neĝo!"

Mi ne konis la montaron. Ĝi estis la alta Stuhlek kun siaj rokaj pintoj kaj grandaj montherbejoj. Somere troviĝas multe da homoj sur tiu ĉi altaĵo. Brutargardistoj, paŝtistinoj, ĉasistoj kaj turistoj. Por la lastaj oni konstruis kabanon proksime al la Stuhlek, sed la kamparanaj junuloj, kiuj malŝatas la urbanojn, detruis ĉi tiun montoneston. Ankaŭ la ĉasistoj ne ŝatas la turistojn, ĉar ili fortimigas la ĉasaĵon. Sed tio ne malhelpas la someran ĝojon. La koro fariĝas malpeza, eĉ al la piediranto, kiu marŝas de Spital al Retteneg — kvin horojn! — kiam li rigardas de ĉi tiuj altoj sur la sunplenajn herbejojn, kie sonas kantado kaj tintado de bovosonoriloj, kiam li rigardas al la malproksimaj bluecaj rokspintoj, kiam li mal-supren vidas la verdajn valojn kun la brilantaj riveretoj kaj dise starantaj dometoj.

Tiaj someraj rememoroj venis al mi, dum ni en la malhela nokto grimpis tra frosto kaj neĝo. La intermontaĵo de Kaltenbaha estas longa, la akvo kunfluanta de la montoj kaj en la somero surdige bruanta, nun kvietis sub glacia kovrilo. Jen kaj jen estis mallarĝaj pontetoj, kiujn ni bone lumigis antaŭ ol surpasi. Ĉi tie ni trovis sufiĉe da viroj, sed neniu el ili trovis postsignon de la knabo. En

unu el la lastaj dometoj de Kaltenbach virino rakontis, ke ŝi vidis la antaŭan tagon ĉirkaŭ la krepusko sur la Kornikoherbejo nigran punkton, kiu ŝajnis moviĝi supren. La Kornikoherbejo iris de la valo supren al la Stuhlek, kaj ĝi estis kovrita per dika, glata neĝtavolo. La virino estis rigardinta kelkan tempon, kaj pripensinta, kio ĝi povas esti. Por esti homo ĝi estis tro malgranda, kaj por korniko tro granda. Tiam la mallumo venis kaj ŝi forgesis ĉion.

„Ĝi estis la eta Francjo,” diris la viroj. „Ni devas suriri la monton”. Neniam en mia vivo miaj piedoj tiel facile suriris la Alpoj ol tiam. La vojoj estis kovritaj per neĝo, sed ĝi estis malmola kaj tenis nin. Sur la deklivoj ni preskaŭ glitis malsupren, ni premis la bastonojn kaj la kalkanumojn perforte en la frostitan neĝon.

„Ĉi tie la knabo certe ne povis supreniri,” mi opiniis.

„Dumtage kaj ĉirkaŭ la vespero la neĝo ankoraŭ ne estas tiom malmola,” klarigis mia akompananto. „Tiam la piedoj trovas firman lokon kaj oni povas antaŭen iri.”

Tiel ni pluen iris, pli rapide ni progresis, ol ni supozis. Ofte ni haltis kaj vokis la nomon de la knabo. Ankaŭ sur la ĉirkaŭantaj montoj ni aŭdis la homojn vokantaj. Sed respondo ne venis kaj postsigno ne troviĝis.

Kiam ni atingis la kabanon de Spital, la nebulo klariĝis kaj ni povis estingi la lanternojn. La kabanaj stari solecaj kaj silentaj, duone kaŝitaj en la neĝo. Ni volis eniri por atendi la kamaradojn, sed la enirejo estis plenneĝa kaj rigardante tra fenestreto, ni povis vidi, ke neĝo kuŝas sur la tablo kaj en la forno, dum kelkaj potoj sur la ŝranko pro la frostoj estas krevintaj.

Ni rapidis pluen, la neĝo fariĝis pli malfirma, sed diversloke ankaŭ pli malseka. Akra vento fajfis ĉirkaŭ niaj oreloj kaj estis, kvazaŭ denove falas la nokto. La vintro deziras sur tiuj ĉi altoj senliman regadon super la tuta naturo; ĉiuj bestoj forkuras antaŭ ol la vintro venas; la homoj restas en la valoj kaj fakte ne scias kiel regas la vintro sur la rokoj. Laŭlonge de kelkaj vojetoj en la montoj oni metas stangojn por ĉiam rekoni la ĝustan vojon. Sed laŭ la vojeto de Spital al Retteneg ne staris tiaj stangoj, ĉar vintre neniu uzis tiun vojon. Mia akompananto kaj mi staris solaj meze en la neĝventego. Neniu sekvis nin ĝis sur la alta Stuhlek, kaj mia akompananto diris, ke la knabo certe ne povis veni tiom malproksimen. Se li volis iri al Retteneg, li certe estas irinta laŭ alia direkto.

Kaj krome, la viro iom memoris, ke Kristina tiam venis en mallumo al Spital de Retteneg.

„Do Franĉjo tute ne scias la vojon?” mi demandis.

„Ne, vere ne,” respondis la servisto.

Kun peno kaj danĝero ni atingis fine tra la neĝventego la Kaltenbah. Ni vadis ĝis la talio tra la freŝa neĝo kaj estis jam tagmezo, kiam ni en Spital revenis. Ni esperis, ke intertempe la knabo jam estas trovita, sed ankaŭ la aliaj revenis sensukcese.

Kristina dume decidis iri laŭ la ĉirkaŭvojo tra la Murzvalo al Retteneg. Ŝi volis scii kun certeco, ĉu la fileto vere ne alvenis tie. Kelkaj homoj levis la ŝultrojn pri tio. Kiel ŝi ankoraŭ povis esperi?

Sed aŭdu, ĝuste sur tiu ĉi vojo, meze de la arbaroj, ŝi renkontis senditon el Retteneg, kiu sciigis, ke en la pasinta nokto la sesjara fileto de Kristina tra neĝo kaj vento sola alvenis en Retteneg. Li estis frapinta je la pordo de Zihofer, kie Kristina servis en la pasinta jaro, kaj li estis demandinta pri sia patrino. Kaj tiam, antaŭ ol la homoj ion alian aŭdis, li falis kaj ekdormis.

Post tio la sendito pluen iris al Spital por sciigi tie, ke ĉesigu la serĉadon. Kristina kuregis al Retteneg, kie ŝi alvenis malfrue vespere. La knabo ankoraŭ dormis, sed li spiris kviete kaj liaj vangoj estis kovritaj de ruĝo.

Nur nun Kristina ekploris. Ŝi ploris tiom forte, ke la homoj timis, ke ŝi pro tio malsaniĝos. Dum la plej granda timo kaj la plej amara doloro ŝi tenis sin trankvila, sed nun pro la granda feliĉo ŝia koro ŝajnis rompiĝi.

La trian tagon post la retrovo la patrino kaj la infano alvenis savitaj en Spital. Onidire la servisto de Rohusberger genuis antaŭ Kristina kaj prezentis al ŝi sian tutan jarsalajron kiel kompenson por la timo, kiun li kaŭzis al ŝi. Sed Kristina diris, per mono aŭ objektoj tio ne estas pagebla, ŝi estas jam sufiĉe ĝoja, ke ŝi rehas la fileton kaj ĉio estas forgesita kaj pardonita.

Kompreneble ĉiuj deziris vidi la knabon. Li estis ĉarma, afabla infano. Kiam mi demandis, kiamaniere li do venis en Retteneg, li respondis, ke li iris tien.

„Jes, sed laŭ kiu vojo?”

„Trans la alta monto.”

„Ho Franĉjo, sed kiel vi trovis la vojon? Ĉu vi ne falis de la rokoj?”

„Mi vidis nenion, estis mallume.”

„Kaj ĉu vi ne iĝis malvarma?” demandis Rohusberger.

„Mi rapide kuris.”

„Kaj ĉu vi ne aŭdis nian vokadon?”

„Estis multe da vento.”

Pli li ne sciis rakonti. La homoj deklaris : „Jen okazis miraklo. Lia gardaĝelo gvidis lin.”

En la valo neĝadis ankoraŭ dum multaj tagoj; kio okazis en tiu vintronokto sur la altaj montoj, tio al la homoj restos kaŝita.

(De Peter Rosegger.)

Trad.: VANE.

LA NOMO DE ZAMENHOF.

Ankoraŭ la vasta mondo ne konas la nomon de Zamenhof. Ĉiu komenco estas malfacila kaj malrapida. Esperanto festis la 50-jaran jubileon en 1937. En la mondhistorio, kaj eĉ en la kulturhistorio 50 jaroj estas tre mallonga periodo. La ĝisnunaj sukcesoj ne estas tre fenomenaj. Sed ni povas konsideri nian nunan staton kiel bonan komencon por venki la mondon.

Antaŭ 50 jaroj vivis nur unu esperantisto. Hodiaŭ estas samideanoj en ĉiuj mondpartoj... neniŭ scias kiom da centmiloj, aŭ ĉu eble estas miliono? Zamenhof kuraĝis ataki la indiferentan mondon per malgranda libreto, la unua lernolibreto de esperanto. Ni centmiloj da esperantistoj neniam rajtas perdi la kuraĝon !

Ni komencas la duan 50-jaran periodon kun 10.000 libroj, valora literaturo, kaj kun jam multaj oficialaj rekonaj de la klera mondo. Dum la unuaj jaroj la esperantistoj centmil-obliĝis. Se post 50 jaroj la 100.000 veraj esperantistoj nur dekmil-obliĝos ni havos ĉe la 100-jara jubileo mil milionojn da esperantistoj aŭ la duonan homaron.

Ĉe la cent-jara jubileo de Esperanto la nomo de Zamenhof devas alte stari inter tiuj de Edison, Marconi, Einstein, kaj de la plej famaj filozofoj.

Edison donis al ni lumon por vidi per la okuloj. Zamenhof donis al ni lumon por vidi per la koroj, ke ĉiuj homoj estas egalaj sub la haŭto de sennombraj lingvo-dialektoj.

Marconi donis al ni la radiojn por sendi vortojn trans landlimojn. Sed Zamenhof donis al ni vortojn kiuj radias al ĉiuj landoj. Zamenhof donis al ni vortojn, kiuj saltas ne nur trans landlimojn sed eĉ trans lingvolimojn.

Einstein montris al ni ke ĉio en la mondo kaj universo estas relativa. Sed liaj teorioj neniam estos komprenataj de la grandaj

homaj amasoj. Sed la bela kaj simpla lingvo de Zamenhof certe estos komprenata kaj ankaŭ parolata de la granda homa amaso, kaj estos kultura trezoro eĉ por simplaj homoj de ĉiuj landoj.

Grandaj filozofoj revis pri filozofiaj, nepraktikaj lingvo-projektoj. Zamenhof estis la plej praktika lingvo-filozofo en la mondhistorio. Li donis al ni lingvon, per kiu povas filozofi kune ĉiuj homoj pri la plej alta celo, nome pri „Paco sur la Tero al ĉiuj Homoj de Bona Volo”.

En la komenco de la 51-a jaro ĉiu sincera esperantisto devas nepre en sia koro promesi resti fidela al esperanto kaj labori multajn horojn por propagandi, instruadi, por legi librojn kaj gazetojn. Nur tiam ni povas esti certaj ke ĉe la 100-jara jubileo de esperanto, la nomo de Zamenhof estos inter la plej brilaj steloj en la mondhistorio.

El „Amerika Esperantisto”.

Joseph R. SCHERER.

Legu kelkfoje ĉi artikoleon kaj rakontu la enhavon al viaj geamikoj.

STRIGO SUR MIA LIBRO-SRANKO.

Tage blinda, nokte verdokula, Kurba nazo klakas kontrolante,
 Ĝi spionas min de sur la ŝranko. Kion skribas mia laca plumo,
 Ĉu pro simpla ina scivolemo? (Ĉu pamfleton, verson, nekrologon?)
 Pro intrigo, aŭ pro taktomanko? Ĉe kandela finbrulanta lumo.

Se perfide min forlasas Muzo,
 Kaj dormemo ŝminkas pala vangon,
 Ĝi ridaĉas, strabe rigardante,
 Kaj senhonte montras al mi langon.

Riga (Latv.) 1938.

Ludmila JEVSEJEVA.

Vendu ilustritajn poŝtkartojn, po 5 cendoj,
 profite al la internacia Junularkunveno!

Subtenu la internacian junularlaboron!
 Varbu abonantojn!

10. DUM VINTRA PLUV'.

$\overset{E}{\text{E}}$ $\overset{E}{\text{E}}$ $\overset{\bar{E}}{\text{E}}$ $\overset{A}{\text{A}}$ $\overset{\bar{A}}{\text{A}}$
 1: E 5 | 1 . 2 3 . 4 | 5 . . 5 . 5 | 6 . 6 1 7 6 |
 Dum vintra pluv' sur vo - jo, sur mar - ĉe ko - ta

$\overset{\bar{A}}{\text{A}}$ $\overset{E}{\text{E}}$ $\overset{\bar{B}}{\text{B}}$ $\overset{B}{\text{B}}$ $\overset{E}{\text{E}}$ $\overset{E}{\text{E}}$ $\overset{\bar{E}}{\text{E}}$ $\overset{\bar{B}^7}{\text{B}^7}$ $\overset{E}{\text{E}}$
 6 5 1 1 . 5 | 5 . 4 4 . 4 | 4 . 3 3 . . | 5 6 5 5 4 3 |
 ter', ja ter', Ek - i - ris fiŝ - kap - tis - to por fi - ŝi al ri-

$\overset{B}{\text{B}}$ $\overset{E}{\text{E}}$ $\overset{B}{\text{B}}$ $\overset{E}{\text{E}}$ $\overset{\bar{B}^7}{\text{B}^7}$
 2 . . 5 6 7 | 1 . 1 2 1 2 | 3 . 3 3 2 3 | 4 . 4 4 3 4 |
 ver', Kun sia pa - ko, kun sia sa - ko, Kun stang'el kano en sia

$\overset{\text{dis}^7}{\text{dis}^7}$ $\overset{\bar{E}}{\text{E}}$ $\overset{B}{\text{B}}$ $\overset{\text{cis}}{\text{cis}}$ $\overset{A}{\text{A}}$ $\overset{\bar{A}}{\text{A}}$
 6 | 5 . 0 5 6 7 | 1 7 6 6 5 4 | 6 |
 ma - no, Kun si - a le - da, hej - tra - la - la - he

$\overset{E}{\text{E}}$ $\overset{\text{fis}}{\text{fis}}$ $\overset{\bar{E}}{\text{E}}$ $\overset{B^7}{\text{B}^7}$ $\overset{E}{\text{E}}$
 5 . 0 4 4 4 | 3 . 3 2 . 2 | 1 . . 0 0 ||
 da, Kun si - a le - da bo - to - par'.

La muelistineto

Ekstaris ĉe la pord', ho pord',

Ke preter ŝi li devu

Marŝadi al la bord'

Kun sia pako ktp.

Cu ŝaldas mi pro pekoj

Aŭ pro malbona far', ho far',

Ke preter vi ne povas

Mi marŝi nun sen bar'

Kun mia sako ktp.

Malbonon vi ne faris,

Ne faris pekojn vi, ho vi;

Sed antaŭ ol foriri,

Tuj donu kisojn tri

Kun via pako ktp.

* El : Internacia Kantaro : „La Juna Vivo”. Por grupoj po 0.25 gld.

Por komencantoj.

NEGRAJ FABELOJ.

(Negroj kondukas kiel infanoj, ili timas la mallumon. Dum vojaĝoj ili plej ŝatas nokte ekbruligi fajron por varmigi la manojn kaj piedojn, kaj rakonti. Iliaj fabeloj ĉiam enhavas ian instruon, kaj la rakontanto farus eraron, se li ĝin ĉefine ne menciis.

(Ĉi sube estas kelkaj popolaj fabeloj.)

1. La ŝakalo. *

Malsata leono ŝteliris en la domon de ŝakalo kaj atendis por formanĝi ĝin.

Sed la saĝa ŝakalo rimarkis la postsignojn de la leono kaj kriis jam de malproksime : „Bonan vesperon, ho domo!”

La domo nenion respondis.

Li kriis duan fojon : „Bonan vesperon, domo!” Sed la domo silentis.

Post tio la ŝakalo kriis akra voĉe : „De kiam vi tiel arogantas, ke vi eĉ ne resalutas?”

Nun la leono obtuze anoncis sin : „Bonan vesperon”.

La ŝakalo ekridis kaj diris : „Mi ne deziras havi domon, kiu nur post la tria saluto respondas.” Kaj gi fuĝis.

La instruo : Estu singardema kiel ŝakalo !

2. La hipopotamo.

Estis iu hipopotamo, Kiboko, kiu premis kaj detruis la tutan ĉirkaŭaĵon, ĉar ĝi estis tre malmolkora kaj mon-avida.

Iun tagon ĝi rimarkis virkokon, kiu staris sur unu kruro, kaj demandis : „Kie estas via dua kruro?”

„Mi vendis ĝin.”

„Al kiu?”

„En la unua vilaĝo, laŭ la rivero, loĝas blankaj homoj, kiuj aĉetas krurojn kaj mi vendis mian al ili.”

„Kiom ili pagis?”

„Milon da kupraj stangetoj!”* fanfaronis la virkoko.

„Se ili tiel multe donis al la virkoko por ĝia malgrasa kruro,

* En Afriko oni taksas la ŝakalon granda ruzulo, kiel ni la vulpon, kiu tie ne vivas.

kiom pli multe ili donos al mi, por mia dika krurego!" Kaj ĝi fornaĝis ĝis la proksima vilaĝo kaj alvokis blankulojn por vendi kruron. Ili diris al ĝi : „Atendu iom, ni tuj venos!" kaj alportis hakilojn por mortigi ĝin.

Instruo : Tio okazas al tiu, kiu mon-avidas !

3. Lulamba.

Vivis foje iu malriĉa fiŝisto, kiu estis tiom malriĉa, ke li ne povis aĉeti edzinon, kaj mem devis kuiri.

Iun tagon li kaptis grandan fiŝon, kun grandaj, nigraj okuloj, kaj mire li diris : „Kiel belokula estas tiu ĉi fiŝo! Se ĝi estus knabino, mi prenuŝin kiel edzinon!"

Tiumomente la fiŝo aliformiĝis en knabino, kaj diris : „Mi konsentas, prenu min!"

La fiŝisto ektimis, sed la knabino diris : „Mi ne estas fiŝo, mi estas vera knabino; mi nomiĝas Lulamba. Sorĉisto aliformis min en fiŝo, kaj mi restu fiŝo, ĝis iu homo dezirus min kiel edzinon. — Volonte mi estos via, nur neniam diru al mi, ke mi estis fiŝo!"

La fiŝisto promesis tion, kaj ili geedziĝis. Lulamba bone kuiris kaj estis brava edzino. La fiŝisto sentis sin bone. Eĉ infanetojn ili havis, kaj tiuj infanoj estis bonaj kaj obeemaj.

Iutage la edzo ekdisputis kun sia edzino, kaj kriis al ŝi : „Silentu kiel fiŝo, ankaŭ pli frue vi estis fiŝo!"

„Ĉar vi hontigas min antaŭ la infanoj, dirante, ke mi estis fiŝo, mi denove estos fiŝo!" respondis la virino, ŝi aliĝis en fiŝo kaj — hop — saltis en la akvon. La infanoj aliĝis en fiŝetoj kaj ek-saltis post la patrino. — La fiŝisto restis sola, kaj devis, kiel iam, mem kuiri.

La instruo : Al neniu riproĉu lian malaltan devenon. Se vi prenis sklavinon kiel edzinon, neniam rememorigu ŝin, kio ŝi estis. Kaj ankaŭ la promeson ne forgesu !

El „De l' tagiĝo ĝis la vespero" de Fran Mazuraniĉ, Kroatujo (Jugosl.).

Trad. J. VELEBIT.

* La negroj en Kongo ne bone konas la eŭropajn monspecojn. La kupran stangeton ili uzas kiel monon. La stangetoj estas longaj proksimume 10 cm., kaj 1000 da ili valoras 20 orfrankojn. Por kokino oni pagas unu stangeton, por kokino 20, por kapro 200, por sklavo 700, kaj por sklavino ĝis 3000 stangetoj.

Respondu al jenaj demandoj :

1. Kia estis la leono? Kien ĝi iris? Al kiu apartenis la domo? Kion intencis la ŝakalo? Kia estis la ŝakalo? Kion ĝi rimarkis? De kiu estis la postsignoj? Al kio kriis la ŝakalo? Kion ĝi kriis? Ĉu la domo respondis? Kiomfoje kriis la ŝakalo? Ĉu la domo respondis post la dua krio? Kion la ŝakalo fine kriis? Kiu tiam respondis? Kion diris la leono? Ĉu la ŝakalo eniris la domon? Kion ĝi diris? Kio estas la instruo?
2. Kia estis la hipopotamo? Kion ĝi detruis? Kio okazis iun tagon? Ĉu la koko staris sur du kruroj? Kion demandis la hipopotamo? Kie estis la dua kruro? Al kiu la koko vendis la kruron? Kie loĝis la blankaj homoj? Kiom ili pagis por la kruro? Ĉu la koko fanfaronis? Kion pensis la hipopotamo? Kien ĝi iris? Ĉu la blankaj homoj aĉetis la kruregon de la hipopotamo? Kion ili faris? Kio estas la instruo?
3. Kia estis la fiŝisto? Kial li men devis kuir? Kion li kaptis iun tagon? Kiaj estis la okuloj de la fiŝo? Kion diris la fiŝisto? Kio okazis? Kion diris la knabino? Ĉu la fiŝisto ektimis? Kiel nomiĝis la knabino? Kiu aliformis la knabinon? Kion la fiŝisto ne rajtis diri? Ĉu la fiŝisto promesis tion? Kio estis Lulamba? Kiel la fiŝisto sentis sin? Kion ili havis? Kiaj estis la infanoj? Kio okazis iun tagon? Kion la fiŝisto tiam diris? Kial la virino denove fariĝis fiŝo? Kien ĝi iris? Kio okazis al la infanoj? Ĉu ili sekvis la patrinon? Kio estas la instruo?

? E N I G M O J

- | | |
|---|---|
| 1. — kun b riverlimo. | 2. . . x . . — angla titolo. |
| — kun h bandaĉo. | . . . x . . — parto de la korpo. |
| — kun k fadeno. | . . . x . . — meblo. |
| — kun l angla titolo. | . . . x . . — ronda ludilo. |
| — kun m vundo. | . . . x . . — reĝa seĝo. |
| — kun n ĉieldirekto. | La vortoj konsistas el 5 literoj; legitaj |
| — kun p enmura malfermaĵo. | de supre-malsupren la mezaj literoj |
| | formas la nomon de rusa monero. |

T. Sv. MARTIN. (CSR.). D. VOJO. Amsterdam (Ned.). G. FRANSEN.

Inter la ĝustaj solvintoj ni lotumos 2 premiojn. Solvojn ni akceptos ĝis 1 aprilo.

LA SOLVOJ EL No 6.

- | | | |
|---------------------------|------------|-------------------------|
| 1. v s | 2. legendo | Ni volonte ricevos sim- |
| teo eta | apetito | plajn enigmojn. |
| verda stelo | fenikso | (Kun solvoj!) |
| ido ulo | | |
| a o | | |



INTERNACIA JUNULARKUNVENO

Atentu : La kunveno okazos **10-17 aŭgusto**, kaj ne 14-21 aŭgusto. Angla grupo petis pri tiu ŝanĝo, ĉar la lernejlertempoj en Anglujo finiĝas ĝenerale 22 aŭgusto.

Unu grupo menciis, ke ili jam pristudas la kantojn el la „Juna Vivo”-kantaro. Ni urĝe konsilas al ĉiu partoprenonto fari la samon, por ke ni havu komunan kantprogramon. La kantaro (kun muziknotoj) kostas por vizitontoj nur 20 cendojn anstataŭ 35 cendoj.

Gesamideanoj, kiuj deziras tendumi en Groet, povas elekti el 33 kampterenoj. Pli ol 100 meblitaj domoj kaj pensionoj laŭ diversaj prezoj estas je la dispono de tiuj, kiuj deziras pasigi sian libertempon en Groet.

Donacoj por la kaso de la internacia junularkunveno :

S.ro B. en Bakkum, f 0,50; S.ro Sp. en W.-Graftdijk, f 1,00; v. V. en West-Graftdijk, f 10,00; F. J. en West-Graftdijk, f 0,10; „Norda Stelo”, kunveno en Bergen (9 jan.) entute, f 5,90; kunveno en Alkmaar (10 jan.), f 2,00; S.ino O., Purmer, f 0,25; S.ino M., Wassenaar, f 3,00; S.ino V., Wassenaar, f 0,50; angla amiko, 8,90; esp. grupo en West-Graftdijk, f 5,00.

2-a LISTO DE PARTOPRENONTOJ EN LA JUNULARKUNVENO EN GROET.

Kimraj lernantinoj sub la gvidado de F.ino Rebecca J. Rees.

NOMO	Aĝo	ADRESO
41. Rhona Davies	15	5, Standert Terrace, Seven Sisters, Anglujo.
42. Lilian Davies	14	6, New Church St. » » »
43. Mary Hoskins	13	5, Martyn's Avenue » » »
44. Martha May Jones	13	Miskin House » » »
45. Barbara Bartlet	13	51, Martyn's Avenue » » »
46. Brenda Card	13	11, Mary Street » » »
47. Menna Thomas	13	61, Martyn's Avenue » » »
48. Gwenda Davies	13	39, Gard en City » » »

Komuna adreso : Girls' School, Seven Sisters, Neath, South Wales, Anglujo.

Nederlandaj knabinoj : 49. C. v. Egmond kaj (50) A. v. Niekerk (18-j.), Gravestraat, 12 Wassenaar.

Nederlandaj knaboj : 51. F. Meydam (18-j.), Lingestraat 11, Leerdam; 52. Kuilenburg, Fonteinstr. 2, Leerdam.

Jam anoncis sin pli ol 80 infanoj. Inter ili p. 20 knaboj.



LA JUNA VIVO VOJAĜO

AL PRAHA KAJ TIROLO.

Ĉu vi vidas la aŭtobuson super ĉi tiu rubriko? Ĉu vi aŭdas la zumadon de la motoro, kiu deziras flugrapide tiri nin al fremdaj landoj, sur montoj kaj tra valoj, tra arbaroj, kamparoj kaj erikejoj? Ĉiam ĝi estas servopreta, sed pleje ĝi ŝatas servi al esperantistoj. Tirante ne-esperantistojn, ĉe la landlimo ĝi sekrete protestas, iom hezitas. Kiu akre aŭskultas, aŭdas, ke ĝi grumblas pri stultuloj, kiuj ne sciante la mondlingvon, vizitas alilandanojn. Sed tirante esperantistojn, ĝi preskaŭ saltas trans limojn!

Nunjare ĝi portos nin al malproksimaj landoj, al Ĉeĥoslovakujo, Tirolo, Svisujo, kaj kun plezuro ĝi plenumos sian devon.

La leganto jam komprenas, ke ni parolas pri samspeca vojaĝo, kiel la redakcio ankaŭ la antaŭan jaron organizis, kaj pri kiu la partoprenintoj estis tiom entuziasmaj.

La redakcio planis 15-tagan kampad-vojaĝon tra naŭ landoj. Kial kampad-vojaĝon? Por ŝpari monon. Precipe en la nuna tempo estas nur malmultaj personoj, kiuj povas elspezi grandan sumon por somervojaĝo. Tial la redakcio elpensis rimedon por limigi la kostojn. Se la vojaĝantoj dormas en tendoj, preparas mem siajn buterpanojn kaj teon, kaj vizitas la restoraciojn nur por tagmanĝi, ili bezonas relative nur malgrandan sumon.

Ĉu vi opinias la dormadon en tendoj malagrabla? Kiom vi eraras! Se oni serĉas tute kvietan lokon en la montaro, for de la homoj, lokon, kie oni aŭdas nur la misterajn sonojn de la naturo, kaj oni vekiĝas pro la voĉoj de la birdoj, oni sentas sin refreŝigita korpe kaj anime.

Vere, kiu deziras ĝui la belecon de la naturo, partoprenu en tia vojaĝo!

La plej granda valoro de la vojaĝo tamen estas, ke ni povas propagandi nian idealon. Ni ornamas la aŭtobuson per grandaj tuko, sur kiuj estas skribitaj niaj devizoj. En la fremdaj landoj ni renkontas samideanojn, kaj la komuna idealo tuj kreas amikan sferon inter ili kaj ni.

Pro tio la redakcio plenfide konsilas al vi : Se vi disponas pri mono kaj libera tempo, partoprenu!

La tuta vojaĝo kostas nur 56 guldenojn. Kiu kunprenas propran tendon, ricevas rabaton : 2 guldenojn por ĉiu dormloko kiun ĝi enhavas. Do : 56 guldenoj por : sidloko en komforta aŭtobuso, ĉiuj manĝaĵoj kaj tendluo. Ankaŭ estas enkalkulitaj la vojimpostoj en Germanujo, Ĉeĥoslovakujo kaj Aŭstrio, kaj la restadimposto en Francujo.

La partoprenantoj plej verŝajne ne bezonos pasporton. Atesto pri nederlandeco sufiĉas.

La venonta numero de „La Juna Vivo” enhavos detalan vojaĝprogramon.

Jam nun oni povas anonci sin. Estas dezirinde, ke oni baldaŭ faru tion, ĉar la nombro de sidlikoj estas limigita. Jam nun kelkaj mendis lokon.



KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO

Aperis artikoloj pri la internacia junular-kunveno en : „Haarlemmer Courant”, „Svenska Arbetar Esp.”, „Het Kind”, „De Bode”, „Schoolblad”, „Alkmaarsche Courant”, „Schager Krant”, „Krant voor de Duinstreek”, „Ryper Nieuwsblad”, „Rotterdamsch Dagblad” (ambaŭ eldonoj), „Gouds Dagblad”, „Dordse Courant”, „Vijf Rivieren”, „Proletarische Vrouw”.

Daŭrigu ĉi tiun laboron, sed ne forgesu sendi gazetojn al la redakcio de „La Juna Vivo”.

ATENTU :

Svedujo : Ĉar John Karlsson ne plu havas konstantan loĝlokon, li ne povas resti peranto. Nunaj svedaj perantoj do estas : Eldona Societo Esperanto, Stokholm, 1, Box 698, ĝironumero 578; kaj Sveda Esp. Oficejo, Barnhusgatan 8, Stokholm.

Ĉeĥoslovakujo : Nova adreso Ĉeĥosl. Esp. Asocio : Praha II, Trularska 16, poŝtĉekkonto 12.371.

En **Polujo** kaj **Hungarujo** oni povas pagi la monon por „La Juna Vivo” je la poŝtĉekkonto de „La Praktiko”. Ĝironumeroj : Budapest 13201, Warszawa 195916.



RICEVITAĴJ ESPERANTAJOJ

TUTMONDA ADRESARO DE LA ESPERANTISTOJ, 1938. — 128 paĝoj, formato 15 × 23 cm., prezo 1,00 guld. Eld. la aŭtoro (Bundesstrasse 154, Bisamberg bei Wien, Aŭstrio). — Granda adreslibro de esperantistaj kaj individuoj, aranĝita laŭ landoj kaj lokoj. La adresoj de la internaciaj organizaĵoj kaj de la esp. gazetoj estas troveblaj en apartaj ĉapitroj. La libro enhavas pli ol 5000 adresojn en pli ol 2500 lokoj de 106 landoj.

ELLERNU ! D.ro Fr. Szilágyi. — Progresiva kurso de esperanto. 112 paĝoj. Formato 16 × 23 cm. Prezo 0.65 us. dol. plus 10 % sendkosto (afrankite 1,20 guld.). Eld. „Literatura Mondo”.

LA SUNKRONO. Marie Koenen. El la nederlanda lingvo tradukis P. Ĉh. M. v. d. Vijver. 104 paĝoj, form. 15 × 20 cm., prezo : bind. 1,50 guld.; broŝ. 0,80 guld. Eld. „Malnova Turo” en Eindhoven.

Klarigo : Ni eksciis, ke laŭ nova leĝo en Jugoslavujo ĉiu presajo devas esti de la registaro esplorita kaj aprobita. Do „Perlo de Jugoslavio” aperos tuj post tiu aprobo! Same „Niaj Vizagoj”.

KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en la jaro senpagan korespondadreson ne pli grandan ol du linioj.

Estonio : S.ro Oskar Weber, Roosna-Tammiku pag., deziras korespondi.

Anglujo : S.ro Lloyd Smith, 654, Piccadilly St., London, deziras gekorespondantojn, precipe el Kanado. Respondo garantiata.

Latujo : S.ro Bruno Voits, fotografo-kemiisto, dez. kor. kun gesamideanoj en ĉiuj landoj (precipe fotogr., kem. temoj), Riga, Stabu i IIIa, 7.

Latujo : F.ino M. Steingold, dez. interŝ. ilustritajn poŝtkartojn kun ĉiuj landoj. Riga, Ausekla i. 6a, -1.

Latujo : S.ro A. Reinfelds deziras interŝangi ilustritajn poŝtk. kun ĉiuj landaj gesamideanoj, Riga, Reveles i. 62-5.

Latujo : S.ro Aleksandro Balodis deziras korespondi pri okultofilozofiaj demandoj. Riga, Bullu iela 12-1.

Maroko : S.ino Irène Fink, 71, Bd Moulay Joussef, dez. interŝ. pm. jubileajn, aerajn, bonfarajn, memorajn, kun ĉl. (nedifektitajn). Afranku per novaĵoj. Anonco ĉiam validas.

Nederlando : E. Vlug, Schermerhorn (N.H.), dez. korespondi kun eksterlandaj gekamaradoj 15-20 jaraj. Ankaŭ interŝ. poŝtm. Resp. certa.

Nederlando : S.ro P. M. v. Vliet, ĵurnalisto, Cronjéstraaat, 25, Leeuwarden, petas ĝentilan alsendon de uzitaj poŝtm., ĉiulandaj, por komitato kiu sendas malsanulinon al Svisujo por resaniĝo. Petu fabrikojn kaj oficejojn en via urbo, ke ili donu siajn pm. por tiu celo. Dankon.

Polujo : Mi bezonas adresojn de tutmondaj geknaboj por miaj 50 gimnazianoj (13-17 jaraj), kiuj dez. interŝ. poŝtk. il, leterojn, poŝtmarkojn. Respondo garantiata. Prof. Sygnarski, Bydgoszcz, Koreckiego 23.

Polujo : 17 jara junulo dez. kor. kun samaĝaj geesperantistoj. M. Gartenstein, Warszawa I, Twarda 15, Polujo.

Polujo : 16-jara gimnazia lernanto dez. kor. kun samideanoj el ĉiuj landoj. Adr.: J. Mazurkiewicz, Pruszcz-Bagienica, Pomorze.

Polujo : S.ro Eugenjasz Gizinski, Ozorków, Legionów, interesiĝas pri (popol)muziko kaj ilustritaj poŝtkartoj.

Ĉinujo : La esp. movado en Ŝanhajo nuntempe estas en malbona situacio! Por subteni ĝin donace sendu kiel multe da poŝtmarkoj (uzitaj). Adr. : S.ro Ĉoĉa, 14/169 Carter Road, Ŝanhajo.

Ĉeĥoslovakujo : S.ro Otokar Michl, studento de Ĉsl. réalka, Hradec Králové, dez. interŝ. poŝtm., il. poŝtk. kun ĉiuj landoj. Resp. certa.

Nederlando : La infangrupo „La Nova Mondo”, Weerdingen (D.), aranĝos letervesperon. Respondo certa.

Svedujo : La Esp. Klubo de Fallköping aranĝos letervesperon, je la 30-a de marto 1938. Karaj Gesamideanoj : Skribu al ni! Per la skribado vi helpos nin en nia laboro por esperanto. Ĉiu rivecos respondon! Skribu al : F.ino Alva Johansson, St. Olofsгат 41, Fallköping.

Francujo : 23 jara junulo deziras korespondi kun fremduloj. Respondo certa. Lucien Laplace, 40 rue aux Juifs, Argentan (Orne).

Svedujo : Kelkaj gekomencantoj dez. kor. kun ĉiuj landoj. Skribu al : S.ro Erik Karlson, Olatorp, Duvhult.

Nederlando : En marto ni aranĝos letervesperon por 2 elem. kaj 1 daŭrigkurso. Sendu let. aŭ il. poŝtk. al : S. Kuiper, B 47, Schagen. Resp. certa.

ANONCETOJ (30 c. por ĉiu linio).

KIAL, vendiĝis dum unu jaro 4000 „Internacia Lernolibreto”j?

Jen la solvo : La metodo en „La Juna Vivo” estas bazita sur la realeco. 1. La memoro de infanoj estas bonega. Do multaj vortoj (proksimume 50 en ĉiu leciono). 2. La scio treege malrapide kreskas en la cerbo de infanoj. Do tre malmulte da gramatikaj malfacilaĵoj. Ankaŭ por simplaj homoj ĝi estas la plej taŭga metodo. La prezo estas nur 0,20 guld. Tuj mendu specimenon.

SKRIBA KURSO POR A. kaj B. (nur por holandlingvanoj). Tre detala B-kurso. Gvidanto **S. Aarse**. Petu senpagan prospekton. Ĉiu kandidato sukcesis. **La Verda Stelo, Radioweg 45, Amsterdam-O.**

30-a UNUIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN LONDONO. Ĝis 6-1-38 aliĝis al la kongreso 825 personoj el 25 landoj. Sekretario : C. C. Goldsmith, Heronsgate, Rickmansworth (Herts), Anglujo.

BILDO D.ro ZAMENHOF, formato 36 × 28,5 cm., tre bela, prezo 0,60 guld., prezo de poŝtkartformato 0,06 guld. Mendeblaj al „La Juna Vivo”, West-Grafdijk.

ĈIU ESPERANTISTO NEPRE KONATIGU KUN INTERNACIAJ GAZETOJ!
Por 0,40 guld. (3 resp. kup) oni ricevas 10 diversajn esp. gazetojn.

MALKARAN, VARIAN LEGAĴON trovas ĉiuj esperantistoj en malnovaj noj de „L. J. V.”. Por 0,20 guld. oni ricevas 10 ekz., laŭplaĉe samajn aŭ diversajn.

„LA JUNA VIVO”-TEATRAĴOJ. La plej efika maniero por paroligi komentantojn estas prezenti teatraĵetojn. Multajn laŭdajn leterojn ni ricevis de ĉiuflanke pri „La Juna Vivo”-teatraĵetoj. Jam aperis :

„La novaj Vestoj de la Reĝo” (15-20 inf. aŭ plenaĝuloj, triakta).

„La elektraj Lampoj de la Sinjorino” (3 plenaĝuloj k. 2 inf., 1-akta).

„La Naskiĝtago” (8 infanoj, 3-akta).

„Kion faras la Patro tio ĉiam estas bona” (8 plenaĝuloj aŭ inf., 1-akta).

„La tro longa Pantalono” (4 plenaĝuloj aŭ infanoj, 2-akta).

„Paŝtisto de Porkoj” (7 aŭ pli inf. aŭ plenaĝuloj, 5-akta).

Prezo : 0,10 guld. (1 resp. kup). Mendebla ĉe „La Juna Vivo” kaj ĉiuj Esperanto-librejoj.

Esperantaj gazetoj, aboneblaj ĉe „La Juna Vivo”.

Verda Revuo , monata jara f 1,50	Esperanto-Internacia , mon. jara f 2,50
Nia Gazeto , monata » f 0,90	Bulteno de I.S.A.E. , dumo-
Scienca Gazeto , dumonata » f 1,50	nata » f 1,35
Heroldo de Esp. , semajna... » f 6,80	La Praktiko , monata » f 2,50
Niaj Vizagoj , monata » f 0,65	

Specimenoj : Ni sendas senpage specimenon de „La Juna Vivo”. Specimenojn de aliaj gazetoj ni sendas (se en stoko) kontraŭ 5-cenda poŝtmarko.

La red. de „La Juna Vivo” neniel respondecas pri neregula apero de la supraj gazetoj !

Presejo A. Hessens, Bruselo.